

ULYSSES (ULYSSES)

JAMES JOYCE tr. KRIS LONG

KUN ADAPTADO
(Nivelo : plejfacile)
POR LA KONTENCANTOJ

Ni montras la facilecon de artikoloj jene:

Plej facile (520 vortoj) ●
Iom malpli facile (1000 vortoj) ■
Ne aparte facile ▲
Plej malfacila ■

Majeste Bok Moligan venis de l'stuparo, portante pelvon da ŝaŭmo kun sur ĝi, kruceto, spegulo kaj razilo. Flavan tualetobon, senzonan, la milda matena aero trenis post li. Alte tenante la pelvon li ĉantis :

- Introido ad altare Dei. Venu, Kinĉj, terura jezuito.

Solene li suprenpaŝis la rondan pafsoklon. Li turnis sin kaj benis trioble la turon, la ĉirkaŭan kamparon kaj la vekigaŭtajn montojn. Rimarkante Stefanon Dedalon, li klinis sin al tiu kaj rapide krucosignis en l'aero, gluglante en la gorgo, skuante la kapon. Stefano Dedalo malkontente, dormeme, kuŝigis la brakojn supre de l'stuparo kaj malsimpatie rigardis la sku-gluglan vizaĝon, ĉevale longan, kiu benis lin, la kverke helkolorajn, kverk-vejnajn netonditajn harojn.

Bok Moligan spionis momente sub la spegulon kaj tuj kovris la pelvon.

- Ni barakeniru, li diris severe.

Predik-tone li aldonis :

- Ĉar jen, miaj kare amataj, la vera Kristino : korpo, animo, sango, vundoj. Soleman muzikon, mi petas. Fermu l'okulojn, viroj. Momenon. Ĝenas tiuj blankaj korpuskloj. Silenton, ĉiuj.

Li suprenstrabis kaj longe fajfis alvokon, iom paŭzis tre atente, la blankaj dentoj ie-tie brilis orpinte. Ĥrisostomos. Orbuŝa. Du fortaj akraj fajfoj respondis tra l'kvieto.

- Dankon, oĉjo, bonege, li kriis vigle.

Ĉu vi bonvolos malŝalti l'elektron ?

Li saltis de sur la pafsoklo kaj solene rigardis la rigardanton, volvante ĉirkaŭ siajn krurojn la faldojn de l'robo. L'ombrita vizaĝo, pufa, kun malafabla vangovalo, ŝajnis lin prelato, mezepoka artpatrono. Plaĉa rideto aperis sur liaj lipoj.

- Mokinde, li diris gaje. Via absurda nomo, antikva greko.

Li fingromontris amik-moke kaj iris al la parapeto, ridante al si mem. Stefano Dedalo alpaŝis, sekvis lin lace duonon de l'vojo kaj sidis rande de l'pafsoklo, rigardante lin apogi la spegulon kontraŭ l'parapeto, trempo la broson en la pelvo, kaj ŝaŭmi la vangojn kaj kolon.

La voĉo de Bok Moligan daŭrigis gaje.

- Mi havas absurdan nomon mem : Malaĉi Moligan, dudaktile. Sed mi sonoras helene, ĉu ne ? Ĉu ni iru al Ateno ? Ĉu vi venus se mia onklino elturnus dudek pundojn ? Li formetis la broson kaj, ĝue ridante, kriis :

- Ĉu li venos ? Kazua jezuito.

Cesante, li komencis razi sin zorge.

- Diru, Moligan, Stefano diris mallaŭte.

- Jes, mia kara ?

- Kiom longe restos Henz en la turo ?

Bok Moligan montris razitan vangon trans la dekstran ŝultron.

- Dio, terure, ĉu ne ? li diris senkaŝe.

Peza saksano. Li opinias vin ne ĝentilhomon. Do, fiangloj. Stopitaj de mono kaj konstipo. Ĉar li estas oksfordano. Vi, Dedalo, perfekte kondukas oksforde. Li trovas vin enigma. Jes, mi plej bone nomis vin : Kinĉj, la klingo.

Singarde li razis la mentonon.

- La tutan nokton li deliris pri nigra

pantero, Stefano diris. Ĉu li havas pafilon ?

- Veinda lunatiko, Moligan diris. Ĉu vi timaĉis ?

- Jes, Stefano diris energie, timante eĉ pli. Nekonato delire ĝemas en mallumo, ke li pafos nigran panteron. Vi savis dronantojn, sed mi ne heroemas. Se li restos, mi estos for.

Bok Moligan strabis al la ŝaŭmo sur sia razklingo. Li saltis de sur la ŝtupo kaj komencis urĝe serĉi en la pantalonoŝoj.

- Fek, li kriis rauke.

Li iris al la pafsoklo kaj diris, ŝovante manon en supran poŝon de Stefano :

- Pruntu la nazĉifonon por viŝi la klingon.

Stefano lasis lin tiri kaj montri, tenante ĝin per angulo, malpuran ĉifitan naztukon.

Bok Moligan lerte viŝis la klingon. Kaj diris, rigardante la tukon :

- La nazĉifono de l'bardo. Nova koloro por irlandaj poetoj : mukverka. Ĝi preskaŭ gustas, ĉu ne ?

Li alpaŝis la parapeton kaj rigardis la dublinan golfon; liaj blondaj kverkpalaj haroj apenaŭ ondis.

- Dio, li diris mallaŭte. Alĉjo ĝuste nomis la maron : "dolĉa griza panjo", ĉu ne ? Mukverda maro. Skrotstreĉa maro. Epicinopa ponto. Ah, Dedalo, la grekoj. Mi instruos. Legu ilin en l'originalo.

Thalatta ! Thalatta ! Nia granda dolĉa panjo. Venu, rigardu.

Stefano ekstaris kaj iris al la parapeto. Klinante sin kontraŭ ĝin, li rigardis l'akvon kaj poŝtisipon, kiu aliris el la Kingston-haveno.

- Nia potenca patrino, Bok Moligan diris. Subite li turnis l'explorantajn okulojn for de l'maro al la vizaĝo de Stefano.

- Laŭ mia onklino vi murdis la patrinon, li diris. Do ŝi ne permesas al mi rilati kun vi.

- In mortigis ŝin, Stefano diris malgaje.

- Kial ne surgenuiĝi, diable, Kinĉj, kiam petis la mortanta patrino, Bok Moligan diris. Mi estas hiperboreo, same kiel vi. Sed via patrino, imagu, ŝi petis vin per la lasta spiro, preĝi por ŝi surgenui.

Vi rifuzis. Malbonaŭgura trajto.

Li haltis kaj iom reŝaŭmis la vangon.

Tolerema rideto kurbigis liajn lipojn.

- Sed bele li mimas, li murmuris al si, Kinĉj, la plej bela mimanto.

Li razis sin zorge kaj glate, en silento, serioze.

Stefano, surkubute kontraŭ l'roka granito, apogis la frunton permane, rigardante la ĉifonon randon de brile nigra jakmaniko. Doloro, ankoraŭ ne amoloro, ĉagrenis lian koron. Silente, en sonĝo, ŝi venis al li mortinte, la konsumita korpo en bruna tombvesto odoris vaske kaj palisandre, ŝia spiro, kiu turnis sin mute, riproĉe, al li, apenaŭ odoris je malseka cindro. Trans frotita manikrando li vidis la maron - granda dolĉa panjo, laŭ la sata voĉo apude.

La ringo de l'golfo kaj horizonto entenis verdan likvamason. Blanka porcelana pelvo apud ŝia mortlito entenis verdan galon, kiu ĝemaj vomoj forŝiris de l'putranta hepato.



Li razas SIAN vizaĝon.



Li razas SIAN vizaĝon.



Li razas LIAN vizaĝon.

Bok Moligan reviiŝis la razklingon.
 - Ah, hundido de Dio, li diris afable, mi donos ĉemizojn kaj ĉifonojn. Ĉu taŭgas la brokarta pantalono?
 - Ne malkomforte, Stefano respondis.
 Bok Moligan ŝvingis la spegulon duoncirkle tra l'aero por disflagrigi l'anoncon en sunlumo nun radia sur la maro. Ridetis la razitaj lipoj kaj la randoj de la brile blankaj dentoj. Rido kaptis lian tutan fortikan trunkon.
 - Rigardu vin, li diris, terura bardo.

(....)

La pardon ombris eniranta formo.
 - La lakto, sinjoro.
 - Eniru, onjo, diris Moligan. Kinĉj, portu la kruĉon.
 Maljunulino aliris kaj staris ĉe l'kubuto de Stefano.
 - Bela mateno, sinjoro, ŝi diris. Gloron al Dio.
 - Al kiu? Moligan diris, strabante al ŝi. Ha, jes, kompreneble.
 Stefano retroklinis brakon kaj prenis la kruĉon el la ŝranko.
 - L'insulanoj, Moligan diris facilanime al Henz, ofte priparolas la kolektanton de prepucioj.
 - Kion, sinjoro? la maljunulino demandis.
 - Litron, Stefano diris.
 Li rigardis ŝin verŝi en la mezurilon, kaj el ĝi en la kruĉon, riĉan blankan lakton - ne la ŝian. Kaduke ŝrumpintaj mamoj. Ŝi verŝis pluan mezuron kaj ankoraŭ izometon. Kaduke kaj sekrete el matema mondo, eble mesaĝe. Ŝi laŭdis la bonecon de la verŝata lakto. Kaduce apud bovino je tagiĝo en fekunda kampo, sorĉistino surfunge, faltitaj fingroj urĝas la ŝprucantajn cicojn. Bovinoj rose silkaj muĝas ĉirkaŭ la konata ŝi. Silkaj bovinoj kaj maljunulino, nomoj donitaj al ŝi prae. Vaganta virinaĉo, senmortulino degenerinta, ŝi servas tiujn, kiu venkis kaj kiu gaje perfidos, kokrite de ambaŭ, mesaĝo de l'sekreta mateno. Ĉu serve, ĉu admone, li ne divenis: sed peti favoron de ŝi li ne volis.

- Jes, vere, onjo, Bok Moligan diris, verŝante lakton en la tasojn.
 - Gustumu ĝin, sinjoro, ŝi diris.
 Li trinkis laŭ ŝia peto.
 - Se ni nur manĝus tiom bone, li diris al ŝi iom laŭte, ne svarmus putraj dentoj kaj intestoj. En tiu ĉi lando oni loĝas en marĉo, manĝaĉas, la stratojn kovras polvo, ĉevalfeko, ftizkraĉoj.
 - Ĉu vi studas medicinon, sinjoro? la maljunulino demandis.
 - Vi pravas, onjo, Bok Moligan respondis. Stefano aŭskultis en malŝata silento. Ŝi klinas la maljunan kapon al voĉo, kiu laŭte alparolas, ŝia ost-fiksanto, medicinisto; min ŝi ne respektas. Al la voĉo, kiu absolvos kaj oleos por la tomo la tutan ŝin krom malpura lombo de virino, ne disimile farita el vir-karno, predota de l'serpento. Al laŭta voĉo, kiu nun petas ŝin silenti kun mire moviĝemaj okuloj.
 - Ĉu vi komprenas, kion li diras? Stefano demandis ŝin.
 - Ĉu la francan vi parolas, sinjoro? la maljunulino diris al Henz.
 Henz parolis al ŝi pli longe, memfide.
 - L'irlandan, Bok Moligan diris, ĉu vi havas la gaelan?
 - Mi supozis, ke l'irlanda, ŝi diris, pro la sono. Ĉu vi venas de l'okcidento, sinjoro?



III RAZA SIAN VITAJN RECIPIROKON (ĉu: UNTU LA ALIAN).

- Mi estas anglo, Henz respondis.
 - Anglo, Bok Moligan diris, laŭ kiu ni parolu l'irlandan en Irlando.
 - Certe ni devus, la maljunulino diris, kaj mi hontas ne paroli la lingvon mem. Bela lingvo ĝi estas, laŭdire, laŭ tiuj, kiuj scias.
 - Pli ol bela, Bok Moligan diris. Absolute mirinda. Pli da teo, Kinĉj.
 Ĉu tason, sinjoro?
 - Ne, dankon, sinjoro, la maljunulino diris, kroĉante la tenilon de l'laktujo sur la brakon por foriri.
 - Ĉu fakturon vi havas?
 Stefano plenigis tri tasojn.
 - Fakturon, sinjoro? ŝi diris, haltante.
 Nu, sep matenojn duonlitron je du pencoj sep duojn do ŝilingon kaj du pencojn kaj tri matenojn litron je kvar pencoj do tri litroj do ŝilingon krom ŝilingo kaj du entute do ŝilingojn du pencojn, sinjoro.
 Bok Moligan veis kaj, ŝtopante la buŝon per pankrusto kun butero ambaŭflanke, etendis la krurojn kaj serĉis en la pantalon-poŝoj.
 - Pagu afable, Henz ridetis al li.
 Stefano verŝis trian tason, plenkuleron da teo en la dense riĉa lakto, Bok Moligan elfosis florenon, turnis ĝin tra l'fingroj kaj kriis:
 - Mirakle!
 Li transdonis la monon, pere de aliaj ĉe la tablo, al la maljunulino, dirante:
 - Nenion petu plu, karulin'. Kion mi povas, tion mi donas.
 Stefano metis la moneron en ŝian malvolontan manon.
 - Ni ŝuldos du pencojn, li diris.

(....)

El-Joyce-igis:
KRIS LONG

maledeno

H.ELIK S.SIRE

